
# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-21 n-ro 362


# Biofuelo el pajlo kaj ligno



Malio: manifestacio kontraŭ sklavismo de la migrantoj en Libio

Malsukcesis intertraktado pri formado de kabineto en Germanio

Japanlando – la nombro de malliberigitaj maljunuloj kvarobliĝis en 10 jaroj

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

## Fermiĝis la konferenco de UN pri klimata ŝanĝo en Bonno
*Bazo por efektivigo de la Pariza Interkonsento p. 03*

## Malio: manifestacio kontraŭ sklavismo de la migrantoj en Libio okazos hodiaŭ
*Post elsendo de video, kiu montras personojn venditajn sur bazaro en Libio p. 04*

## Malsukcesis intertraktado pri formado de kabineto en Germanio
*La Liberal-Demokratia Partio deklaris sin retiri el la intertraktado p. 04*

## Zimbabvo: giganta manifestacio por peti «novan komenciĝon»
*Por peti de la prezidento Robert Mugabe, ke li bonvolu demisii p. 05*

## Japanlando – la nombro de malliberigitaj maljunuloj kvarobliĝis en 10 jaroj
*Entute 2 498 homoj aĝantaj pli ol 65 jarojn p. 05*

## Biofuelo el pajlo kaj ligno
*Procedo per kiu lignorestaĵoj aŭ pajlo povas esti konvertataj al dizelecaj fueloj p. 06*

## Hodiaŭe
*Isaac Bashevis Singer; Voltaire; kaj Insulo Alexander p. 07*

# Fermiĝis la konferenco de UN pri klimata ŝanĝo en Bonno

Frumatene de la 18a de novembro laŭ la loka tempo en Bonno de Germanio fermiĝis la konferenco de UN pri klimata ŝanĝo. Fiĝia ĉefministro Frank BAINIMARAMA, prezidanto de la konferenco, diris en la fermo, ke ĉiuj partioj konscias la neceson alpreni decidan agadon por trakti la klimatan ŝanĝon, kaj la konferenco havis progreson en detala efektivigo de la Pariza Interkonsento.



**Bazo por efektivigo de la Pariza Interkonsento**

Ĝi estis la unua konferenco de UN pri klimata ŝanĝo, post kiam Usono retiriĝis de la Pariza Interkonsento. La internacia komunumo daŭrigis la komencan tendencon de la Pariza Interkonsento kaj montris fortan politikan volon. Ankaŭ usonaj ŝtatoj, urboj, entreprenoj kaj neregistaraj grupoj promesis plu subteni la trakton de klimata ŝanĝo. En la ferma tago la intertraktado pri financa subteno al malriĉaj landoj daŭris ĝis frua mateno. En du semajnoj la delegitoj por la intertraktado ellaboris multe da dokumentoj. En la venonta jaro, surbaze de tiuj dokumentoj estos elfaritaj detalaj reguloj pri efektivigo de la Pariza Interkonsento.

**Ĉinaj kontribuo kaj projekto**

La agadoj de Ĉinio kaj la pozitiva rolo de la ĉina delegacio fariĝis fokuso de la konferenco. Delegitoj de diversaj landoj kaj internaciaj organizoj laŭdis la pozitivan rolon de Ĉinio en traktado de klimata ŝanĝo.

Laŭ donitaĵoj el la monda aŭtoritata organizo, Ĉinio fariĝis la plej granda produktanto, konsumanto kaj investanto de renovigeblaj energifontoj en la tuta mondo. Spencer DALE, ĉefekonomikisto de la Brita Petrol-kompanio, diris, ke Ĉinio kondukas la akcelitan disvolvadon de tutmondaj renovigeblaj energifontoj. En 2016 Ĉinio kontribuis 41% de la tutmonda kresko de renovigeblaj energifontoj, kio superis la tutan kvanton de la kresko de la Organizo por Ekonomiaj Kunlaboro kaj Disvolvo.

Ĉinio estas unu el la landoj, kiuj plej frue sankciis la Parizan Interkonsenton kaj plej frue liveris al UN land-projekton pri trakto de klimata ŝanĝo. En 2015 Ĉinio promesis, ke ĝia ellaso de karbona dioksido atingu la kulminon kiel eble plej frue proksimume ĝis la jaro 2030. Ĉi-jare Ĉinio komencis studi la tempoplanon pri ĉesigo de produktado kaj vendado de tradici-energifontaj veturiloj. Nun Ĉinio estas la plej granda produktanto kaj konsumanto de novenergifontaj veturiloj en la tuta mondo.

Samtempe, ankaŭ la rolo de Ĉinio en la tutmonda klimata regado estas vaste agnoskita. En la konferenco, Ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj António GUTERRES diris, ke Ĉinio montris gravan gvidadon en la ekonomia disvolvo, medio kaj klimato kaj aliaj kampoj por multaj jaroj, kaj estas grava kunlabora partnero de Unuiĝintaj Nacioj en multflankaj procezoj.

LIU Ziji
El Popola Ĉinio

# Malio: manifestacio kontraŭ sklavismo de la migrantoj en Libio okazos hodiaŭ

En Malio, pluraj manifestacioj okazos ĉi-lundon la 20an de novembro post elsendo de video, kiu montras personojn venditajn sur bazaro en Libio. Tiu raportaĵo, filmita de la usona televidkanalo CNN, pri la ekzistado de aŭkciaj vendoj en Libio de sub-saharaj migrantoj, estigas indignon.




Miloj da migrantoj, kiuj forlasas Malion ĉiumonate, plejparte atingas Alĝerion aŭ Libion. Parte pro tio, la situacio tiel indignas, aparte en la civila socio, kiu alvokas al pluraj kolektiĝoj ĉi-lundon la 20an de novembro.

«Sid-manifestacio» okazos matene antaŭ la libia ambasadejo en Bamako, poste manifestacio en simbola loko, la Memorpiramido, starigita memore al la martiroj de 1991, kiam Malio liberigis sin de la diktaturo.

La indigno estas ankaŭ politika. Malio estas unu el la maloftaj landoj de la afrika kontinento, kiu konservis ambasadoron en Tripolo, malgraŭ la sekureca situacio. Li estis repatriigita de la Malia diplomatio.

Koncerne la Libian aferŝarĝiton en Bamako, li estis kunvokita «signoproteste, kaj por postuli ĉesigon de la barbareco», eksplikis Abdoulaye Diop, ministro pri Fremdaj aferoj.

Neniam Milito Inter Ni

---

# Malsukcesis intertraktado pri formado de kabineto en Germanio

Germanaj amaskomunikiloj raportis dimanĉe [19 nov 2017], ke la Liberal-Demokratia Partio deklaris sin retiri el la intertraktado pri formado de la Germana kabineto. La germana novaĵ-agentejo opiniis, ke tio signas malsukceson de la intertraktado.



Proparolanto de la Liberal-Demokratia Partio diris dimanĉe vespere en Berlino, ke la partio sin retiros el la intertraktado pri formado de la kabineto, kiu okazis sub la dominado de la ĉefa koalicio de la parlamento kaj kun la partopreno de la Liberal-Demokratia Partio kaj la Verda Partio. Prezidanto de la Liberal-Demokratia Partio Chirstian Lindner diris, ke lia partio decidis retiri el la intertraktado, ĉar ĉiuj rilataj partioj ne povas starigi reciprokan konfidon.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Zimbabvo: giganta manifestacio por peti «novan komenciĝon»

Ekde la mateno de la 18a de novembro, grava homamaso respondis la alvokon manifestacii sur la stratoj de la ĉefurbo, Harareo, por peti de la prezidento Robert MUGABE, ke li bonvolu demisii.



Lanĉita de la ĉefo de eks-batalantoj en la milito pri sendependenco de Zimbabvo, kaj de la civila socio, la alvoko al manifestacio sur la stratoj de Harareo estis aŭdita. Ekde la mateno, la korespondantoj de la BBC ateste raportis pri «ĝoja homamaso sur la stratoj de la ĉefurbo, postulante la demision de la prezidento Robert MUGABE, kaj celebrante la rolon de la armeo, kiu dolĉigis la premon de tiu potenco».

Trankvile la homoj atendas, «svingante flagojn de Zimbabvo, starantaj sur bustegmento, aŭ sidantaj sur siaj veturiloj, funkciigante siajn hupojn», raportas la retpaĝo de la BBC.

Manifestacianto konfidas al la ĵurnalistoj: «Tiu tago celas lanĉi novan komenciĝon».

Post du tagoj da senfruktaj intertraktadoj ĉe la prezidenta palaco, kie la 93-jara Ŝtatĉefo estis ĉirkaŭata de asembleo de intertraktantoj petante de li, ke li demisiu, Robert MUGABE publike aperis vendredon la 7an de novembro, sed «li parolis nur por malfermi diplomiĝan ceremonion ĉe universitato», aldonas la raporto.

Pluraj regionaj estroj intervenis siaflanke ĉe televido por postuli la foriron de la prezidento «kaj la demision de lia edzino, Grace MUGABE, membro de la reganta partio».

Kvankam tiu paca manifestacio ne malimplikas la situacion, «la timo, kiu longe malhelpis la homojn surstratiĝi, ŝajne malaperis», notas la BBC.

Neniam Milito Inter Ni

# Japanlando – la nombro de malliberigitaj maljunuloj kvarobliĝis en 10 jaroj

Laŭ informoj diskonigitaj vendrede la 17-an de novembro, la nombro de malliberigitaj maljunuloj en Japanlando kvarobliĝis en 10 jaroj, malgraŭ tio, ke en la jaro 2016-a krimofteco estis la plej malalta en la historio de tiu lando.



Entute 2 498 homoj aĝantaj pli ol 65 jarojn estis arestitaj pasintjare, kio signifas kvaroblon de la nombro de la jaro 1997-a, kion indikas “Blanka Libro pri la Krimo”, piblikigita de la japana Ministrejo pri Justico.

Oni supozas, ke kadre de malliberiĝo la pliaĝuloj provas trovi “hejmon”, celante fuĝi el siasocia izoleco kaj malriĉeco.

Per esploro ĉe japanaj malliberejaj centroj, la juristo de Keio-Universitato (Tokio) nome TATSUYA Ota konstatis, ke en la japanaj malliberejoj la plimulto de la maljunuloj plenumanta malliberigon estis spertantaj mankon de ligoj kun parencoj, amikoj kaj najbaroj, antaŭ siaj arestoj.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# Biofuelo el pajlo kaj ligno

Pli kaj pli kreskas la merkata bezono pri biofueloj. En la regiono de *Graz* nun oni disvolvis procedon per kiu lignorestaĵoj aŭ pajlo povas esti konvertataj al dizelecaj fueloj.



Ĉe tiu procedo la biomaso, en la koncerna kazo lignorestaĵoj, tritika pajlo aŭ kano sen aldono de oksigeno estas varmegigataj en likva portanta medio ĉe pli ol 300 gradoj C. Kiel portanta medio estas uzata vakua gasoleo (VGO). Tiu maso varmegiĝas tiel longe ĝis la biomaso kaj la vakua gasoleo "krevas", tio signifas ke la makromolekuloj estas disigataj al pli malgrandaj frakciaĵoj. Ĉe 390 gradoj C preskaŭ 40 procentoj laŭ pezo da biodevena karbono estis konvertataj al krudaj frakcioj de karbonhidrogenaĵoj.

Firmao en Stirio jam patentigis tiun produktan procedon. Ĉefa avantaĝo de la likvafaza pirolizo estas la rekta konverto de solida biomaso al likvaj kaj solidaj karbonhidrogenaĵoj per teknike relative simpla proceda paŝo. Malavantaĝo estas tamen la disigo de la portanta likvaĵo. Kaj ĝuste tion la sukcesiga recepto de la bioKREVAa procedo solvas: Ĝi samtempe disigas la biomason kaj portantan oleon kies disigo estas dezirata.

En pilota instalaĵo ĉe mineralolea konzerno en Aŭstrio la konvertado de ĉirkaŭ 100 kilogramoj da solida biomaso hore kaj malfacile boligebla VGO estis testataj jam dum du jaroj. Tiel estiĝas fuelo kun proksimume 10 procentoj da biodevena materialo kiu povas rekte esti prilaborata en rafinejo. 15 procentoj de la biodevena karbono solviĝas en la nekrakitan portantan oleon. Tiu solvaĵo per plua proceda paŝo en rafinejo povas esti gradigata al fuelo.

La procedo kaj la testrezultoj pri la optimuma reakcia temperaturo kaj la konsisto de la biomaso publikiĝis en faka ĵurnalo. La sekva paŝo estus demonstra instalaĵo. Por ekonomia funkciado la biokreva procedo devus esti testata laŭ industria skalo.

La plej grava produkto estas la biokrevaa oleo. En ĝi troviĝas ĉirkaŭ 21 procentoj de la aldonita biodevena karbono. Ĝi konsistas el krakita VGO kaj la disigaj produktoj de la biomaso. Je laboratoria skalo oni jam sukcesis likvigi la biodevenan karbon.

Krome estiĝas likvafaza pirolizoleo kiu pro sia alta konsisto el oksigeno kaj acido kaj akvo ne estas rekte aplikebla kiel energiportanto aŭ kiel biofuelo. La likva konsistero devas esti liberigata de oksigeno kaj hidrogeno por esti uzebla kiel fuelo. En plua projekto oni nun volas taŭgigi tiun teknologion por la praktiko.

Esperanta Retradio



## Isaac Bashevis Singer

**Isaac Bashevis Singer [jide קחצי סיוועשאב רעגניז jiĉĥok baŝevis zinger] (naskiĝis en 1902 en *Leoncin* (Pollando, sed tiam parto de Rusia imperio), mortis la 24-an de julio 1991 en *Miami* (Florido)) verkis multajn librojn, precipe romanojn, plejparte en la jida lingvo, kaj ricevis la Nobel-premion pri literaturo de la jaro 1978.**

**Singer lernis Esperanton kiam li estis juna kaj eĉ provis skribi rakonton en Esperanto.**

**Vikipedio**

---

## Voltaire



**Voltero, france Voltaire [volTER], pseŭdonimo de François Marie Arouet [franSŬA maRI arŬE] (naskiĝis la 21-an de novembro 1694 en Parizo, mortis la 30-an de majo 1778, 83-jara, samloke) estis franca verkisto kaj filozofo.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

**Montaroj de Insulo *Alexander*.**

**Vikipedio**